

NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice

n-ro 3/2000



KIE NOKTOJ ESTAS BLANKAJ

La internacia buso de transporta entrepreno „Biacomex” forveturas el Białystok al Riga je la 17.15. Antaŭ ni la longa vojaĝo- tra Litovio, Latvio... Ni veturas al Tallinn al 36. Baltiaj Esperanto Tagoj. Jam la trian fojon mi partoprenas en ĉi tiu nekutima, simpatia impreso. Je la 2.30 ni alveturas Rigon. La busa stacidomo fermita, pluvas, estas malvarme. Ni havas tamen feliĉon. Je la 3.h. alvenas la plenplena buso el Vilnius al Tallinn. Ambaŭ ŝoforoj komprenante nian malfacilan situacion, kompatas al ni kaj nia triopo el Krzeszowice enbusiĝas.

Je la 8.h. matene ni estas en Tallinn. Multaj opinias, ke la ĉefurbo de Estonio apartenas al la plej fascinantaj lokoj en Eŭropo. Nia unusemajna restado en eksa Rewel konfirmas plene ĉi tiun opinion. Ni spertas diversmanierajn impresojn. Ni partoprenas en multnombraj esperantaj imprezoj- okazas prelegoj, interkonatiĝaj vesperoj, prezentado de E- libroj kaj E- gazetaro., komencas personaj kontaktoj. Ni ekkonas ankaŭ Tallinn-on kaj ĝies ĉirkaŭaĵon, originalan kulturon kaj tradicion de Estonio. Ni ĝuos finfine la blankajn noktojn dum kiuj regas krepusko kaj neripeteble belega Malnova Urbo ŝajnas droni en la roza rebrilo. La blankaj noktoj daŭras komence de junio ĝis duono de julio kaj la 36. BET okazis inter 1 -9 de julio. La organizantoj de la impreso jam de komence penas montri al partoprenantoj la magian ĉarmon de la urbo. Ili gvidas nin el Malsupra Urbo tra la ŝtona ŝtuparo tn. Mallonga Piedo al la Katedrala Monto.. Jen la Supra Urbo kies la centro konsistas el la placo kun la katedralo kaj Lossi Plats kun la ortodoksa preĝejo kaj parlamentodomo. La grizaŝtona kastelo Toompea- dominantanta super la ĉirkaŭaĵo estis konstruita de la Ordeno de Glavofratoj en XIII j. Nian admiron vekas la turo Longa Hermano el 1370. El diversaj lokoj de la Supra Urbo ni rigardas la panoramon de Tallinn. La diferenco de 50m. Inter niveloj de Supra kaj Malsupra Urboj kaŭzas nekutiman impreson- ŝajnas, ke la deklivaj, koloraj, tegolaj tegmento- kvazaŭ ektuŝas nin. Al la Malsupra Urbo ni descendas laŭ Longa Piedo. Jen la plej grandioza templo de Tallinn- la kirko al S. Olofo el XIIIj. En la mezepoko la kirko servis kiel centro de la religia vivo de skandinavdevena loĝantaro. Kaj finfine la imponaj XIVj. Defendmuregoj kun dekelko da pitoreskaj defendoturoj starantaj vice apud si. La tallinnaj urbo- fortikaĵoj apartenis al la plej potencaj en la tuta Norda Eŭropo. La ĉarman promenadon tra la Malnova Urbo ni finas sur la Urbodoma Placo. La antikva urbodomo sin gloras per eksterordinara, svelta turo. Ĉiudimanĉe floras ĉi tie merkato. La popolvestitaj vendistoj ofertas buntajn manufakturaĵojn. Mian atenton skuas tamen la Magistrata Apoteko- la griza, unuetaĝa konstruaĵo kun alta, ruĝtegola, dekliva tegmento kaj kun la granda, gotika surskribo super la enirejo. Raeapteek- la unua apoteko en Estonio kaj unu el la plej malnovaj en Eŭropo, senĉese agas, verŝajne de la fondjaro 1422. En XVI ĝies farmisto estis iu Wolfgang Holzwirt el Gdansko. Al tallinna Malnova Urbo ni revenos ankoraŭ kelkfoje por ke ravigu pri ĝia ĉarmo, ripozu sur benketoj, parolu kun tre simpatiaj homoj- angle kaj ruse, ĉar kompreneble la

estonan ni ne konas. Kontraŭe, en la kongresejo regas Esperanto. La partoprenantoj de BET devenas el 12 landoj, sume 200 personojn. Poloj 52. 49 el Białystok kaj nia triopo el Krzeszowice. La atmosfero kiel kutime grandioza. La organiza komitato kaj inter ili August Kilk kaj Valev Kruusalu laboras ofereme kaj efike. La programo tre varia. Agas la Somera Universitato. Prelegoj pri ekstreme diversaj temoj ekzemple: literatura kreado de Astrid Lindgren, politika kaj ekonomia situacio en baltiaj landoj, Esperanto en Europa Unio, kreado de Tolkien. Atraktivaj, amuzaj vesperoj. Estona Asembleo de Kanto kaj Danco ĝojigas okulojn per belegaj vestaĵoj kaj fascinas per spontanaj dancoj. Loĝantaninoj de insulo Hiumaa prezentas proprefaritajn artaĵojn, Latvanino Austra Pumpura kantas la neforgesitan antaŭjaran furorkanzonon el BET 35- „Tie, kie naskiĝas vent „.

La simpatia asembleo el Białystok instruas polajn kanzonojn kun esperantaj tekstoj.

Ĉiuj renkontoj estas gravaj sed por nia grupo la plej grava estas renkonto kun Petras Čielauskas, la ĉefredaktoro de kaŭnasa dumonatrevuo „Litova Stelo „, Jam delonge E- istoj el Krzeszowice abonas la revuon, alte aprezante ĝin pro la editora nivelo kaj diverstema, ĉiam interesanta enhavo. Petras Čielauskas estas bonega E-isto, lingvisto kaj historisto.

Ni partoprenas ekskurson al la Nacia Parko Lahemaa en la centro de la norda bordo de Estonio. Lahemaa signifas- Golfolando. Krom golfoj plenaj de aluviaj stonegój, Lahemaa riĉa estas en dekelko da grandaj kaj centoj da plimalgrandaj lagoj. Ni vizitas Palmse en kiu troviĝas unu el la plej belegaj en baltiaj landoj- palaco kaj parko devenanta el XVI j. En Võsu, sur la suda bordo de golfo Käsnu- mirinda plaĝo, banloko, sablaj dunoj kun pinarbaretoj kaj... la malgranda, ligna kabano de August Kilk, konata E-isto, spiritisto kaj samtempe fervora aktivulo de BET.

Interesa estas ankaŭ ekskurso al la Estona Liberaera Muzeo nemalproksime al Tallinn. La promonado tra 84- hektara surfaco permesas ekkoni la vivon de estona provinco en diversaj epokoj. Oni kolektis ĉi tie pli ol 70 kamparanaj kabanoj de XVI – XIX j. Komplete ekipitaj per objektoj de ĉiutaga vivo. Ni trovas akvomuelejojn, ventmuelejojn kaj situitan ĉe la marbordo fiŝistan vilaĝon. En la malnova gastejo kovrita per pajla tegmento oni aranĝis stilan manĝejon kie oni povas ankaŭ gustumi la tradician, kamparanan pizosupon.

Finfine libera tago por uzo laŭdezire kaj laŭbezzone. Mi kaj Anjo ekiras al la haveno. Estas 8.55. La motorŝipo al Helsinki debordas je la 9.00. Rapida decido- ni naĝas. En la lasta momento- doganigo. Unu kaj duonhora vojaĝo tra Finna Golfo kaj ni estas en la ĉefurbo de Finnlando. Antaŭ ni la tuta tago en Helsinki. Ni vizitas la havenon, klasikismajn antikvaĵojn, dominantan super la urbo, la katedralon sur la placo al la caro Aleksandro II, La urbo estas amika al homoj. En la centro, paralele al trotuaroj estas situitaj biciklaj vojoj. Bicikloj estas ĉi tie ege popularaj. Kraków kaj Helsinki estas du el naŭ eŭropaj kulturaj ĉefurboj 2000. La ĉefurbo de Finnlando rekomendas sin kiel urbo de informatiko kaj moderna teknologio.

Agrable estas pasigi kelkajn horojn en ĉi tiu bela urbo. Ni ripozas sur la ĉeborda benko. La suno varmigas forte, estas belega, julia tago. Vespere post longa vagado ni revenas lacaj al Tallinn.

En la antaŭlasta tago de nia restado ni preparas sin ankoraŭfoje por promeni tra la urbo. Estas du lokoj kiuj ni volas nepre vidi. Fine de la strato Pikk- kortuŝa momento. Sur la muro dulingva, pola- estona tabulo memorigita bravuran forkuron de la internigita en Tallinn, submara ŝipo „Orzeł „ – 17/18 de septembro 1939. Kelkdeko da metoj pluen, la dua objekto- la marmora, rompita arko memore al tragedio de dronigita pramo „Estonia”.

Vespere, adiaŭo- ĝis la venonta jaro al BET-37, en Litovio ie en ĉirkaŭaĵo de Kaunas. Malantaŭ mi tri renkontojn. BET-34,35,36. Veisiejai- Litovio, Liepaja- Latvio, Tallinn- Estonio. Ĉiuj tre sukcesaj. Tri baltiaj landoj, travivantaj unuaj, ĝojplenaj jaroj de libero kaj samtempe malfacilaĵoj de transformigo kun granda emocio gastigas Esperantistojn el diversaj landoj. Ni kore dankas al ili pri tio.